[noto] fonto: "budhana kuriero", n-ro 6, 1963
represo: “La Japana Budhano”, n-ro 349, 2009

# *Kio estas Ahimsa?*

**Anuruddha**, Hindujo

La vorto Ahimsa estas sanskrita kaj signifas Ne-perforton, kaj estas la kontraŭo al Himsa, perforto. La prefikso "a" havas la saman rolon en la sanskrita lingvo kiel en Esperanto "mal", sed ĝi ne estas tiel regule uzata kiel ĝia esperanta ekvivalento.

Laŭ Budhismo, Ĵainismo, kaj inkluzive de multaj Hinduaj sektoj, la vorto Ahimsa estas la fundamenta principo de la religiaj aŭ filozofiaj doktrinoj, kaj Ahimsa estas apud la sankta unusilabo "OM", la unuiganta ligilo de ĉiuj hindaj religioj.

Ahimsa estas la vera karaktero de la vivo, ĉar ĝi sin turnas egale al homoj kaj bestoj, kaj Ahimsa kulturas en la estaĵuloj Amon, Veron kaj Bonvolecon (sanskrite: Prem, Sat kaj Maitri).

Ahimsa ne estas ligita al iu speciala kredo aŭ dogmo, sed apartenas al ĉiuj homoj, kiuj havas bonan volon, senrigarde ĉu ili estas membroj de iu eklezio aŭ nur liberpensuloj.

Ahimsa estas la interna urĝo ami kaj pritrakti aliulojn same kiel oni volas esti amata kaj estimata de ili. Ahimsa estas naskita el Universala Vidpunkto kiu rekonas unuecon laŭ Vero, unuecon laŭ la Memo, kaj unuecon laŭ la celo en la diversaj formoj de la vivo.

La Budho, same kiel Mahaviro, diris: "Malamo ne ĉesas pro malamo, sed malamo sole ĉesas pro Ne-malamo; tio ests antikva leĝo!"

Pro tio, serĉanto de Amo nepre devas vivi laŭ la principo de Ahimsa. Kaj estas sole pro la konsekvenca adoptado de Ahimsa ke oni povas finfine trovi Pacon kaj la beatecon de Nirvano.

(出典:Budhana Kuriero, N-ro 6, 1963)